# Informilo

MONATA REVUO DE **FLANDRA ESPERANTO-LIGO**
MAANDBLAD VAN DE **VLAAMSE ESPERANTOBOND**

VERANTWOORDELIJKE UITGEVER:
RESPONDECA ELDONANTO: Jan Bovendeerd, Speeltuinlaan 14, B-2510 Mortsel

J A R K O L E K T O
J A A R G A N G 5 N° 5 Aug./sept. 1985

ATENTINDAĴOJ

- 28 09 1985 : Trilanda Renkontiĝo en Stolberg (GDR)
- 05 10 1985 : Ĝenerala kunsido de FEL, al kiu ĉiu estas invitata. En la tagordo vi trovos i.a. "EKSPOZICIA MATERIALO" Bonvole notu, ke GB/INNO/BM festos sian 100-jaran jubileon de 03 ĝis 19 10 1985. Okaze de tio, GB disponigos al la kulturaj organizoj - inter kiuj ankaŭ ESPERANTO-ekspozici-eblecon. Kompreneble, do, ke nia ekspozimaterialo je la dato de nia ĝenerala kunsido troviĝas en GB Antwerpen. Fru-venontoj al la ĝenerala kunsido povos do viziti la standon kaj informiĝi - propra-okule - pri la materialo, kiu estas, kiel vi scias, je ĉies dispono, post mendo ĉe FEL.
- 23 11 1985 : ĜENERALA JARKUNSIDO DE BEF. Invitataj estas niaj grupaj administrantoj. La membraro de BEF ja konsistas el la administrantoj de FEL kaj APE.

INFORMILO, KADROGAZETO DE FLANDRA ESPERANTO-LIGO
FRANKRIJKLEI 140, 2000 ANTWERPEN
TELEFONO : 03/234 34 00
JARABONO : BF 150,- KONTOJ : 402/5510531-55 KAJ 000-0265338-43

---

## ESTRARO

1. KUNORDIGADO : Ivo DURWAEL (prezidanto) 03/440 30 92
Paul Gilsonlaan 5, 2520 EDEGEM

Jan BOVENDEERD (sekretario)
Speeltuinlaan 14, 2510 MORTSEL

2. FINANCOJ K. ADMINISTRADO (+ turismo + "taksi stop" + eldonoj)
Erik D'HONDT (estrarano) 053/77 44 97
Wilgstraat 25A, 9440 EREMBODEGEM

Paul PEERAERTS (direktoro) 03/234 34 00
Baron Dhanislaan 13, 2000 ANTWERPEN

Christian DECLERCK (kom. pri literaturo/eldonoj)
Amerikalei 135/2, 2000 ANTWERPEN

3. INFORMADO GAZETARA SERVO
Edward SYMOENS (estrarano) 03/666 62 66
Putsesteenweg 131 A, 2180 KALMTHOUT

Herman DECEUNINCK (kom. gazetara servo) 02/360 17 22
Villalaan 1 b.4, 1500 HALLE

Wim DE SMET (kom. sciencoj) 03/666 99 49
Hertendreef 12, 2180 KALMTHOUT

4. INSTRUADO - PROPAGANDO - EKSPOZICIOJ - KONGRESOJ
Petro DE SMEDT (gvida komisionano) 052/21 26 77
Hemelstraat 44, 0330 DENDERMONDE

Marc VAN DEN BEMPT (komisionano) 016/20 14 53
Duisburgsestraat 12, 3030 LEUVEN-HEVERLEE

Albert CLAESEN (komisionano) 011/33 66 03
Zonnebloemstraat 7, 3610 DIEPENBEEK

Ray GERARD (komisionano)
Antwerpsesteenweg 24, 2250 BROECHEM

5. GRUPA AGADO
Hilde VANINGELGEM-VANDRIESSCHE (estrarano) 053/70 50 11
Arbeidstraat 21, 9300 AALST

Trees DOOMS (prelegvojaĝoj) vidu P. Peeraerts

Jules VERSTRAETEN ( OMBUDSMAN) 03/827 66 43
St. Bernardsesteenweg 1078, 2710 HOBOKEN

Rilatoj kun FLEJA : Hilde VANINGELGEM.



## PROTOKOLO

pri la estrarkunsido de sabato 14-a de septembro en Antwerpen

---

Ĉeestis : Erik D'Hondt (ED), Ivo Durwael (ID), Paul Peeraerts (PP), Edward Symoens (ES)- posttagmeze - kaj Jan Bovendeerd (JB).

Senkulpigon petis : Hilde Vaningelgem-Vandriessche.

Prezidis : ID

Protokolis : JB

Komenca horo : 10.00 h.

TAGORDO

1. La protokolo pri la antaŭa kunsido (06 06 85) estas aprobita kun la nura rimarko, ke forgesiĝis mencii inter la ĉeestantoj Hilde Vaningelgem. La protokolinto petas pardonon.

2. TURISMO

Nia gasto, S-ro P.J. van Duijn el Middelburg, ellaboris planon por kampadantoj/Kampademuloj.
Temas pri renkontiĝeblecoj en kampadejoj kaj, laŭ tiu vojo, pri praktika propagando por Esperanto.

La plano estas sufiĉe ampleksa kaj realigebla laŭ-paŝe.

Laŭ ED eblos kunlabori kun VKT (Vlaame Kampeertoeristen).

Laŭ ID la afero estas realigebla nur se iu pretas :
- gvidi la tuton
- prepari la terenon, t.e. arigi la homojn kapablajn kaj pretajn por kunlabori kaj trovi la plej taŭgajn lokojn, disvastigi inform-bultenojn ktp.

S-ro van Duijn akceptas la preparlaboron kaj la gvidadon. Li antaŭ ĉio preparos artikoleton por ESPERANTO PANORAMA, cele al trovado de la necesaj homfortoj kaj al kunvenigo de tiuj ĉi por ellabori laborplanon. Li rekontaktos nin laŭgrade de la evolu-proceso.

S-ro van Duijn, post dankvorto al FEL pro giaj favoraj reagoj, adiaŭas kun la promeso pri regula informado.

3. TASKARO

3.1. La adreslisto de Nederlandaj bibliotekoj ankoraŭ ne estas disponebla.

3.2.1. Prisma Vortaro : la ĉefaj punktoj el la reagoj al nia protestletero al ECN estos publikigotaj en INFORMILO.

3.2.2. Libroservo : en UK en Augsburg vendiĝis 140 serioj da "krokodil-kartoj, samkiel ĉiuj kunprenitaj ekzempleroj de "Jaĥto veturas for ..." de Deck Dorval kaj de "La Aventuroj de Ŝpar kaj alia porkoj" de Rik de Roover. (20 de ambaŭ)

3.2.3. "Kia Miksaĵo" estas finkompostita.
S-ro Van Dooren pagis jam la kompletan eldon-sumon.

3.2.4. La Librovermeto franclingva ankoraŭ ne estas preta. ED kunlaboras kun Ray Gerad pri tio.

3.2.5. Kongreso en Blankenberge : ĉu eldoni kongreslibron ?
Kongreslibro estas interesa nur se estas sufiĉe da anoncantoj, tiel ke la kompleta produktokosto de la kongreslibro estu kovrota de i...
Kongreslibro devas ne esti plia ŝarĝo.
La afero estos pridiskutata okaze de kunveno kun la LKK.

4. ORGANIGRAMO : La nova organigramo (vidu aldonon al la antaŭa numero de INFORMILO) mencias en sia unua paĝo nur ka rubrikon "ESTRARO", dum temas pri "ESTRARO KAJ LABORKOMISIONOJ"
La ricevintoj bonvolu kompletigi tiel la organigramon.

5. Institucio HODLER

5.1. I.H. petas de FEL tujan pagon de certaj kostoj.
PP opinias ke normale nia gajno devas profiti al la Esperanto-movado.
Tamen, ĉu tio implicas ke ni diru : "Nu jes, donu ĝin al I.H." ?

5.2. Lukontrakto
André Mertens-Goossens ellaboris novan kontrakt-proponon akompanatan de tre detala financa kalkulo.
Pri certaj punktoj FEL ankoraŭ ne povas konsenti.
JB estas komisiita sendi eksplikan leteron al AMG.

-----

12.30 h. - PAŬZO

14.00 h. - Repreno.

-----

6. JUBILEA PROGRAMO

ESPERANTO 2000 ellaboris interesan kaj sufiĉe ampleksan jubilean programon sur baze de la UEA-broŝuro "Kiu faru kion".

FEL-estraro alvokas al kiel eble plej aktiva kunlaboro en tiu programo ĉe la lokaj grupoj.

La broŝuro estas ankoraŭ havebla ĉe FEL en la Esperanto-Centro.



7. ENKETO

7.1. Test'5000 altiris 840 interesitojn. Ĉu daŭrigi sur tiu kampo ?
Nia komisiono pri Instruado/Propagando ekzamenu la eblecojn pri pliviĝligo kunlabore kun la Gazetara Servo.

7.2. Tiu ĉi cetere serĉas kunlaborantojn por verki artikolojn.

8. BIBLIOTEKAJ KATALOGOJ

Guido Van Damme - oficisto en GCA - dum malpli ŝarĝitaj laborhoroj, kunmetis projekton de katalogo rilate al Esperanto-verkoj en Flandraj bibliotekoj.
PP/ED faros unuan prezo-taksadon antaŭ ol sondi en la ministeriaj medioj por aĉeto de kvanto da ekzempleroj distribuotaj en la bibliotekoj.

9. FINANCA BUĜETKONTROLO

PP/ED : situacio normala.

10. SUBVENCIOJ (Provincaj)

La Kulturkonsilaro de la provinco Antwerpen, post interveno de nia prezidanto, akceptis konsili pri plialtigo de la jam aljuĝita subvencio de BF 5000 al BF 50.000. Tamen finfina decidrajto havas la Provinca Deputitaro. Tiu ĉi ne akceptis tiun plialtigon, sed konservis la antaŭe buĝetitan sumon de BF 5.000. La kaŭzo verŝajne estas, ke la aljuĝitaj sumoj estis tiel buĝetitaj kaj ke ŝanĝi tion necesas ampleksan proceduron.
Ĉu eble la plialtigo estos akceptita venontjare ? Ni klopodos.

11. INTERNACIAJ KADROKURSOJ

Nia iniciato pri kadrokursoj, kiun ES kaj JB jam defendis en la 1980-UK en Stokholmo kaj el kiu sekvis jam serio da kadrokursoj en la sino de FEL, denove pritraktiĝis en la ĉi-jara UK en Augsburg.
En la tiu-rilata komisiono, Humphrey Tonkin proponis konkretigi la ideon pere de rezolucio laŭ kiu :

1. FEL estu petata :
   a) pritrakti la temaron en ĝenerala perspektivo
   b) interrilati kun tiuj landoj kiuj jam faris ion saman (Francio, Germanio)
   c) faru la preparlaborojn
   d) verku gvidliniaron por ĝenerala uzo
2. UEA kreu centron por kunigi ĉiujn ideojn, sugestojn ktp.

JB, kiu iniciatis kaj organizis la unuajn kadrokursojn en FEL, estas petata prepari, antaŭ la fino de la nuna jaro, projekton kiu estos

prezentita al estraro kaj pritraktata en ĝia venonta kunsido samkiel poste ı UK en Pekino.

'P vidas fakte du celojn el vidpunkto de FEL :
- ĉu FEL disponigu siajn tiurilatajn broŝurojn al la Landaj Asocioj
- ĉu FEL organizu internaciajn kadrokursojn.

La tuja laboro estas prepari planon.

JB promesas sin okupi pri la afero kaj, antaŭ ol definitive prezenti ion, li submetos projekton al la ceteraj estraranoj kaj koncernataj komisionanoj.

12. MERKATADO (Marketing)

ES rentkontiĝis kun S-ro Van Tilborgh, Merkatad-respondeculo ĉe Bank Van Breda. Li diskutis kun li pri la problemoj de ĝeneraligo de Esperanto.
S-ro Van Tilborgh promesis sondi la etoson, sed jam atentigis pri certaj faktoj (kiuj en si mem fakte ne estas novaj por ni), kiel ekzemple daŭra ripeto, propagandi sen ataki aliajn lingvojn k.s.
ES rekontos lin denove je 19 09 1985.

13. Herman De Leeck (Profesoro pri Sociologio en UIA)

ID raportas ke Prof. De Leeck akceptas ke studentoj faru studon pri Esperanto. Al ni trovi pret-ulojn.
ES verkos projekton de cirkulero por instigi studentojn al tiu laboro.

14. ĜENERALA KUNSIDO je 05 10 1985

ID proponas antaŭtagmeze estrarkunsidi kaj okazigi la ĝeneralan kunsidon posttagmeze.
Aprobite.
Do, ekde 10.00 : estrarkunsido
14.00 : ĝenerala kunsido, kun jena tagordo :
1. Kotizoj : - individuaj
familiaj
dumvivaj
2. Kongresoj
3. Ekspozicia materialo
4. Diversaĵoj

JB dissendos invitilo n al la grupaj respondeculoj kaj reprezentantoj petante ilin averti kaj inviti la ceterajn membrojn.
Rilate al la kongreso de 1987, LA VERDA STELO jam kontaktis aliajn landajn asociojn cele al komuna aranĝo. Francio jam rifuzis, Germanio organizos mem kongreson en Sud-Germanio, Luksemburgo jam akceptis kaj kun Nederlando la situacio estas ankoraŭ priesplorata.



Kiel kongresloko oni pensas pri la "Provinciaal Vormingsinstituut" en Malle. Tiu ĉi ne estas tro kosta kaj havas gastigeblecon por 186 personoj. Ceteraj loĝeblecoj ekzistas en la ĉirkaŭaĵo.
La kongresa temo : ESPERANTO KULTURO (propono)

15. DIVERSAĴOJ

15.1. Ekspozicioj :
ID raportas ke GB-INNO-BM 100-jariĝos kaj festos tion de 03 - 19 10 1985. GB disponigos al la kulturaj organizoj ekspozieblecon. Nia problemo estas trovi kunlaborontoj.
Ray Gerard proponis peti de GB, ke ĝi disponigu standon en ĝia normala libro-stando. Tie ni ne metu ekzemple nur unu lenolibron, sed almenaŭ 50-onda plej diversaj verkoj .

15.2. ID raportas ke en ekspozicio kiu okazis en Hasselt (07 09 1985) la sekretario de STUDIO 2000 kontaktis lin por trovi kunlaboron pri parolataj revuoj kaj verkoj por blinduloj.
PP jam petis de CO-Rotterdam sendi la disponeblan materialon.

15.3. Herman Deceuninck sendis reklamilon de "SIRE", nederlanda reklamfirmao. JB sendos ĝin al S-ro Burg en ECN.

15.4. INFORMILO
Leviĝas la demando, ĉu denove pliampleksigi INFORMILON. Ni scias ja, ke antaŭ kelkaj jaroj, ni decidis ĝin redukti al nura protokolado kaj urĝaj komunikoj por malaltigi la kostojn.
Ĉu en la nuna situacio, la financoj permesas denove pli kompletan revuon. PP kaj ED trovas ke jes.
ID do profitos la okazon por publikigi serion da artikoloj rilate al la transakcia analizo, pri kiu jam temis en Loveno, okaze de la Semajno de Internacia Amikeco.

15.5. NATURBORSO
Ĉar en la antaŭaj jaroj evidentiĝis ke ne nepre necesas ripeti ĉiun jaron ekspozicion en la Naturborso, oni povus al si demandi ĉu ni nun, post iom da haltado, denove partoprenu.
Jes, sed kiu povus sin okupi pri ĝi ?
Kiel ajn estu, nun ni profitu plian avantaĝon en formo de nova ekspozicia materialo.

Fino de la kunsido : 17.15 h. JB

Pri vortaro. (vidu punkton 3.2.1. de la protokolo)
-----------

Ke la nova Prisma-vortaro Esperanto-Nederlanda-Esperanto al ni estas promesata de antaŭ pli ol du jaroj, jam estas konata fakto.

Ni jam raportis pri tio en la protokolo pri la estrara kunsido de la 6-a de junio ĉi-jara (p. 3.5.)

Ni sendis plendleteron al Esperanto-Centro Nederlanda kaj al Edistudio same kiel ESPERANTO HASSELT (dankon Hasselt) kaj divenu ilian respondon ? Ĝuste: neniu kulp s !

Nu, por mallongigi eble longan historion, fine ni telefonis al ECN kaj al F-ino Middelkoop.

Por iomete ĝuigi vin, jen la respondo kiun ni ricevis de S-ro Burg, de Esperanto-Centro Nederlanda.

Cetere, ĉu vi jam telefonis s-ino Middelkoop. Ŝi transdonis al mi la "bonan novaĵon" ke Bruĉo Kasini telefonis ŝin kaj informis ke la rest-laboro estas nun preta (li bezonis preskaŭ tri monatojn por korrekti 45 paĝojn en kiuj troviĝis ie kaj ĉi tie preseraroj kelkaj !)kaj li promesis (ha,ha,ha) tuj forsendi rekte, registritre kaj rapidpoŝte la korektitajn paĝojn. Nu, ni atendu.Ĝis nun li (laŭ ni scio kaj sperto) neniam sukcesis pleumi promeson rilate al tempodaŭro. Mi proponas enkonduki en esperanton novan verbon "kasini"-plenumi promeson senkonsiderante fiksitan daton. Kasina promeso; kasina kontrakto (kiu realiĝos post longa prokrasto! Bedaŭrinde ne plu eblas enkonduki ilin en "middelkoop

Restas al ni esperi kaj ... plu atendi.
Se ĉio iros glate kaj glite, ne verŝajne antaŭ la fino de ĉi-jaro povos "festi" la aperon de nia tiom longe atendata (kaj pagita de multaj inter ni) vortaro.

Se venos pliaj novaĵoj, ni certe sciigos ilin al vi.

-------

K L U B O 1 0 0
----------------

Ĉiuj tiuj, kiuj aliĝis al KLUBO 100, pagínte BF 1.000,-, certe jam demandis al si kio fakte okazas/-is kun ilia mono. Kaj prave. Jes, vere, ni neniam raportis pri la aktivecoj de KLUBO 100.



Nu, vere raporti ni ja povas nur rilate al tio, kio okazas/is en FEL.

Ĉi sube ni klopodos doni superrigardon de la plej granda parto de niaj akirajoj aŭ de niaj aktivecoj kadre de Flandra Esperanto-Ligo en rilato kun la jubilea jaro 1987 , la vera celo de KLUBO 100.

ELDONAĴOJ

1. INFORMBROŜUROJ (ni donos la titolon en la lingvo en kiu ili aperis)
   - Claude Piron : ESPERANTO, EEN EUROPESE OF EEN AZIATISCHE TAAL ?
   - Edward Symoens : DE SOCIOPOLITIEKE, PEDAGOGISCHE EN KULTURELE WAARDE VAN HET ESPERANTO
   - Helmar Frank : DE PROPEDEUTISCHE WAARDE VAN DE INTERNATIONALE TAAL ESPERANTO
   - Claude Piron : ESPERANTO : JE VRAAGT MAAR
   - Guido Thys : FLANDRA KAJ NEDERLANDA ESPERANTO-BIBLIOGRAFIO
   - Jan BOVENDEERD : ESPERANTO, KION MI POVAS FARI PER TIO ? ESPERANTO, WAT KAN IK DAARMEE DOEN ?

2. LITERATURO
   - Deck Dorval : JAĤTO VETURAS FOR ..."
   - Felix Timmermans : KRISTNASKA TRIPTIKO
   - Rik de Roover : LA AVENTUROJ DE ŜPAR- KAJ ALIA PORKOJ

3. ALIAJ
   - Erik D'Hondt kaj Petro De Smedt : ESPERANTO EN BELGIO
   - Paul Peeraerts : MANLIBRO DE LA AKTIVULO

4. KURSOJ
   - ESPERANTO PROGRAMITA
   - KORESPONDA KURSO
   - KADROKURSOJ

ORGANIZAĴOJ

- Kolokvoj ( Aalst kaj Leuven)
  la tekstoj estas haveblaj
- Kongresoj : FEL rekomencis sian kutimon tiaman organizi ĉiujaran kongreson. La tria okazos en 1986 en Blankenberge. La kvara en 1987 en Antwerpen.

DIVERSAĴOJ (kaj forgesitaĵoj en la supraj rubrikoj)

- eldono de LIBROVERMETO de Erik D'hondt
- kunmeto de CENTRA KATALOGO PRI ESPERANTO-VERKOJ EN FLANDRAJ BIBLIOTEKOJ
- kreado de nova EKSPOZICIMATERIALO.

Jena listo ne estas limiga, sed daŭre plikomple-tigota.

## L A  I N T E R H O M A J  R I L A T O J  E N  F E L (Ivo Durwael)

### E N K O N D U K O

Io premas min !

Mi konservas unikajn memoraĵojn pro la eksterordinara amika etoso kiun ni travivis dum nia ĉe somera restado en Grésillon kaj en Augsburg.

Je mia reveno en la Esperantoklubo, regis ankoraŭ la feria etoso. Multaj entuziasme parolis pri siaj spertoj.

Subite estiĝis "laborincidento". Grava estrarano konkludis amare : "Mi abdikos ! " For la bela etoso, for la amikeco ...

Homoj kiuj ja amike interrilatas, multe malpli facile sukcesas amike kunlabori. La tensioj inter kunlaborantoj ŝajnas al mi eĉ kreski proporcie al la kvanto da aktivecoj aŭ al la alteco en la hierarkia nivelo.

Ĉu eble ni, gvidantoj en la Esperanto-movado, tro ofte agadas kvazaŭ Esperanto estas celo en si mem ? Ni zorge okupiĝas pri la plej adekvata propagando, pri la lingva nivelo, pri la funkcio de niaj servoj ...

Kompreneble tio necesegas. Sed samtempe ni konsciiĝu, ke Esperanto estas unuavice i l o por plibonigi la internaciajn homajn rilatojn, surbaze de egaleco, interkompreniĝo kaj reciproka estimo.

Ŝajnas al mi sensenca, se ni volas okupiĝi nur pri Internacia Lingvo sen samtempe analizi la homajn rilatojn.

Transakcia Analizo montriĝis epokfara malkovro en la ĉi rilata psikologio. Mi jam aŭdis de multaj interesatoj - kaj mem spertis - ke la Transakcia Analizo estas signifoplena por pli bone ekkompreni sin mem kaj pli alte estimi la aliajn. Ankoraŭ en Augsburg D-ro Tyblewsky (socipsikologo) konfesis al mi kiom influhava estis lia konatiĝo kun la Transakcia Analizo.

Mi jam prelegis pri tiu temo en Leuven kaj Antwerpen. Kelkaj reagoj instruis al mi ke mia parolado ne estis sufiĉe klara. Pro tio mi decidis verki serion da mallongaj artikoloj pri la enhavo de la teorio kaj ĝia tuja apliko por kompreni ekzistantajn situaciojn kaj problemojn en FEL.

Evidente, Transakcia Analizo ne estu nia evangelio. Mi eĉ esperas, ke sekvos pliaj artikoloj aŭ komentoj pri aliaj metodoj, eĉ kritikoj kaj korektoj de T.A. Mi nur imagas ke, se ni, gvidantoj, serioze pristudas la funkcion de la homaj rilatoj, ke ni multe pli rapide kaj facile orientiĝas en la bezonoj rilate propagandon kaj informadon, rilate la strukturon de la kursoj, rilate la funkcion de niaj kluboj ktp.



Mia - eble ankoraŭ iom nebula - idealo por FEL estas, ke ni formu kernojn, kie eĉ, sendepende de Esperanto, la membroj sentu sin akceptitaj tiaj, kiaj ili estas !

Mi esperas je multaj reagoj viaflanke.

### M E M A N A L I Z O

La angulŝtono de Transakcia Analizo estas la mem-analizo.

Tiu, kiu diras : "Mi aŭdis pri io tre interesa. Mi ne bezonas tion. Por vi ĝi estus io bona !" prefere neniam plu malfermu la buŝon pri T.A. Mi mem spertis, ke memanalizo helpis min plej forte por kompreni aliajn. La plej signifoplena epizodo en la homa psiko estas la periodo ĝis la 5-a jaraĝo. Eĉ plej gravas la periodo de la naskiĝo ĝis la 2-a jaro. Ĉiuj spertoj en tiuj vivojaroj estas novaj, unuafojaj. Tiujn jarojn mastras la gepatroj (aŭ la edukantoj) tute aŭtoritate, sen iu ajn prijuĝo. La tutaĵon de ĉiuj restaĵoj el tiu tempo en nia menso ni nomu Gepatro-n (kun majusklo) La Gepatro estas tiu mensa parto, al kiu ni povas alglui la nociojn : kutimojn, tradiciojn, aŭtomatismojn.

Jen ekzemploj : En nia socio ni portas kostumojn, jupojn, ofte malkonfortajn por festoj. Neniu demandas sin kial. Multaj homoj reagas indigne kontraŭ nudismo. En aliaj civilizoj nudaj brustoj estas normalaĵo kaj ni volonte spektas dokumentajn filmojn pri tiuj lokoj, sed nur tre heziteme ni permesas la samon sur niaj strandoj. Ni indigniĝas, sed ne havas klarigon por tio.

Tiu, kiu okupiĝas pri planlingvo konfrontiĝas tuj kun reagoj unuavice de la gepatroj, sed ankaŭ de parencoj, amikoj ktp. kiaj : " Kia sensencaĵo ! Vi perdas vian tempon ! Mi neniam aŭdis pri tio. (sic) Kia frenezaĵo ! "

La kritikantoj ne estas informitaj, ne bezonas, eĉ ne ŝatas ricevi informojn sed tamen kondamnas !

La malkovro de tiu unua ero el nia menso jam havas tre gravan rolon por Esperantisto, ĉar la antaŭjuĝoj kontraŭ Esperanto fontas precipe el la Gepatro !

La duan eron de nia menso ni nomu Infano-n (kun majusklo). Certe ne konfuzu ĝin kun infaneca !

Al ĝi mi gluas la vortojn emocio, intuicio.

Per tiu ero de nia menso, ni povas ĝui la vivon. Ankaŭ nia kreiva kapacito apartenas al la Infano. Tiu parto estas tre grava. La moderna reklamo preskaŭ nur apelaciaŝal la Infano de la konsumantoj. (belaj strandoj, amrilatoj, bruna haŭto, bongusta manĝo, agrablaj koloroj ...)

La tria ero de nia menso ekkreskas de la 10-a vivmonato de infano. Ĝi estas nia kapablo por kolekti informojn, analizi situaciojn kaj prijuĝi ilin. Ni nomu ĝin la Plenkreskulo-n.

Se la Gepatro estas barilo por la akcepto de la ideo pri planlingvo, se la Infano estas la ero, kiun ni bezonas por akceptigi reklamon, la Plenkreskulo estas nia kapacito kiu devas ellabori inform- aŭ reklamkampanjojn.

Gepatro, Infano, Plenkreskulo estas tiuj eroj, kiujn ni povas retrovi en la menso de ĉiu homo : ĉe malgranda infano troveblas jam multe da Gepatro kaj eĉ iom da Plenkreskulo. Ĉe gepatroj troveblas ankaŭ Infano ktp.

La malkovro de nia mensa strukturo kaj la daŭra analizo de ni mem helpas nin por plifortigi nian Plenkreskulon. Tamen atentu, ke T.A. ne strebas por forigi la Gepatron kaj la Infanon : homo, kiu nur scipovas racie pensi estas homo neeltenebla en socio ! Sed la Plenkreskulo gvidu la 2 aliajn erojn : ni devas kuraĝi analizi niajn antaŭjuĝojn (Gepatro), ni devas pezi ĉu ne pli bone estas bremsi niajn sentojn kaj dezirojn (Infano)

En venonta artikoleto, mi ankoraŭ pli detaligos la nociojn Gepatro kaj Infano. Sed eble vi jam baldaŭ konstatos, same kiel mi antaŭ kelkaj monatoj, ke tuj - per ofta memanalizo - ni pli bone komprenas niajn kursanojn, niajn klubanojn ... fakte ĉiujn homojn kun kiuj ni interrilatas.

ID.